

PREZO: 1.- Kr.

Stavroskribo

8724

# MALGRANDA REVUO

Nro 3 · 1948  
6a JARO

## ENHAVO:

|  | Paĝo |
|--|------|
| Unuigitaj ŝtatoj de Eŭropo, de Chr. Heilskov ..... | 1    |
| Piccard en la marprofundo, de K. Wilgenhof .....   | 4    |
| De kie venis la polinezianoj? de Brendon Clark ... | 8    |
| Lingvaj sugestoj, de Stellan Engholm .....         | 24   |
| Literaturo .....                                   | 27   |
| Al la reĝo de la judoj, de L. C. Dej .....         | 32   |

*Redaktoro — Eldonanto:*  
**STELLAN ENGHOLM, LUDVIKA, SVEDUJO**

## MALGRANDA REVUO

aperas kvaronjare. Prezo 1 kr. (inkl. sendkoston). Jarabono 4 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 rpk. — S. Engholm, Skolgatan 9, Ludvika, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 26 80 23.

MR ne aperigas anoncojn aŭ informojn.

### Perantoj

- Aŭstrio: Eldonejo "Tramondo", Neutorgasse 9, Wien I.  
Belgujo: Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeekstr. 3, Brusel W.  
Britujo: Libroservo de UEA, Heronsgate, Rickmansworth (Herts).  
Danujo: Libroservo de CDEL, Fr. Jörgensgade 4 A, Kopenhago N.  
Finnlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki Kä.  
Francujo: Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol, Paris X.  
Italujo: Sro Leo Costantini, Banco di Roma, filiale, Milano.  
Nederlando: Libroservo FLIE, Roelantstr. 4, Amsterdam W.  
Palestino: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalem.  
Polujo: R. Sakowicz, Warszawa (21) — Okęcie.  
Portugalujo: Sro Saidanha Carreira, Av. Grão Vasco, 33, r/c, Benfca-Lisboa.  
Svisujo: Sro O. Walder, Eigenheim, Romanshorn.  
Usono: Libroservo de American Esperantist, 114 W. 16 St. New York 11.

## MALGRANDA REVUO

Nro 3

6a JARO

1948

### Unuigitaj ŝtatoj de Eŭropo — dana propono antaŭ cent jaroj

De CHR. HEILSKOV

La penso pri politika kaj ekonomia ligo de la eŭropaj ŝtatoj estas ĝenerale konsiderata kiel eltrovo de la plej nova tempo. Se mi ĝuste memoras, oni baldaŭ post la unua mondmilito komencis diskuti la temon. Unu el la plej fervoraj por tiu penso estis la aŭstria grafo Coudenhove—Kalergi, kies skribaĵoj pri tiu temo aperis ankaŭ en esperanto. Baldaŭ poste eksplodis la dua kaj eĉ pli detrua mondkatastrofo, kaj tiaj pensoj devis serĉi ŝirmon, dum la uragano furiozis. Nun en nia "atomepoko" la penso pri unuigita Eŭropo estas denove aktuala, altrudita pro la ĝenerala ekonomia kaj morala mizero. Eĉ elstaraj politikistoj kiel Churchill aliĝis al la penso.

La penso pri tiu temo estas tamen prezentita jam antaŭ cent jaroj. La viro, kiu tion faris, estis la dana pastro Hans Bjerregaard.

Li estis filo de la "klera kamparano" Hans Jensen Bjerregaard en Gentofto apud Kopenhago. Li naskiĝis 1766, kaj 1798 li fariĝis parolestro por Hjeremind, Lee kaj Hjorthede en Jutlando, kie li restis ĝis sia morto 1860.

Li estis unu el la plej simpatiaj pastroj en la epoko de la racionalismo, ĉiam okupita pri malĝoisma laboro, precipe por la kamparloĝantaro en sia regiono. La socie utila agado de Bjerregaard atentigis Fredrikon VI pri li, kaj la reĝo vizitis lin 1826. Obelisko en la ĝardeno de la pastrejo memorigas pri tiu okazaĵo. Du jarojn poste Bjerregaard estis elektata konsistoria konsilanto.



Kio precipe interesas nin, estas tamen tio, ke Bjerregaard, estante fervora pacamanto kaj sincera adepto de bona interrilato inter la nacioj, ekhavis la ideon pri unuigita Eŭropo. Tiun ideon li opiniis konfirmita en la konata antaŭdiro de la profeto Daniel pri venonta mondregno en la rakonto pri la statuo kun argilaj piedoj (Dan, 2:44-45).

Tiuj el la skribaĵoj de Bjerregaard, en kiuj li klarigas siajn pensojn pri la unuigitaj ŝtatoj de Eŭropo, estas la tri sekvontaj (ĉiuj presitaj en Randers), kies longaj titoloj sufiĉe bone resumas la enhavon:

"Ĉu la eterna paco estas tia ĥimero kaj neeblo, kiel honorata aŭtoro ĵus estas dirinta?" 1840.

"Ĉu ne I profeta antaŭdiro, escepte de unu sola ankoraŭ ne plenumita okazaĵo, atingis sian plenumiĝon en niaj tagoj? Kaj ĉu ni ne kuraĝas, laŭ tiu kaj aliaj profetaj antaŭdiroj, iam en la estonto atendi II la eternan pacon? III eŭropan universalŝtaton? IV la disvastigon de la kristanismo al ĉiuj popoloj de la tero? kaj V ĝis nun nekonatan moralan kaj feliĉan staton de la homaro?" 1847.

"Ribeloj ĝenerale kaj la ŝlesvig-holŝtejna speciale, kiu estis akcelata de Germanujo, rigardataj precipe el la religia vidpunkto, plue la klopodoj de la pacamantoj por la eterna paco, kiu okazos se ne antaŭ tamen en eŭropa universalŝtato." 1852.

Jam en sia libreto de 1840 la aŭtoro prezentas la penson pri universalŝtato. La "honorata aŭtoro", kiun li preparolas, estis kapitano J. Th. Rader, kiu en libreto de 1839 "Pri armilekzercoj kaj pacmanovroj" provas redukti la pacpenson "in absurdum". Bjerregaard insistas pri kontraŭa opinio. "Kiel rimedojn por firmigi eternan pacon", li skribas, "oni estas proponinta jen politikan ekvilibron, jen ŝtatligon, kiu per daŭra kongreso kiel supera tribunalo decidu ĉiujn malkonsentojn estiĝontajn, jen universalŝtaton. Rilate la lastan mi miaparte kredas, ke tiu sola estas la rimedo, per kiu iam en la estonto estos atingeblaj ne nur eterna paco sed ankaŭ la antaŭe menciita, en niaj sanktaj libroj anoncita pli granda feliĉo inter la homoj."

Tamen precipe en la libro de 1847 la aŭtoro profundigas siajn teoriojn pri la universalŝtato.

Apogante sin sur la profetaĵo de Daniel defendas Bjerregaard tiun opinion, ke la profetaĵo aludas ne al universala spirita sed al universala fizika regno. La atento de la leganto ne povas esti ne rimarkinta, li diras, "ke la regno de Kristo jam estis ekzistanta dum la ekzisto de la tuta roma imperio; sed kontraŭe tiu regno, pri kiu antaŭdiras la profeto, nur poste estiĝos el niaj nunaj eŭropaj ŝtatoj, kiuj plejparte naskiĝis de la okcidenta roma regno, kiu tute pereis en la jaro 476. Sed se la profeto eĉ neniam estus antaŭdirinta ion tian, mi tamen miaparte estus kredinta tiun ŝtaton la plej fidinda rimedo" ktp.

La aŭtoro sentas sin certa, ke tia idealŝtato iam ekestos. "Tiel do niaj posteuloj, post kiam la nacioj de Eŭropo sufiĉe longe estos ne nur tiel nekristane malaminta unu la alian, malhelpintaj la interesojn de siaj najbaroj kaj volonte vidintaj iliajn perdojn kaj malsukcesojn, sed eĉ tiel ofte kaj tiel malhome dispremintaj sin reciproke, detruintaj kaj bruligintaj unu ĉe la alia kaj transformintaj ĉi tiun mondparton en hakeldamon, sangokampon — tiel ili fine elpagos tion, kion iliaj prapatroj kulpis, kiam ĉi ĉiuj nacioj de Eŭropo iam estos unu sola kristana fratpopolo, kiu ĝoje rekonos la egalajn rajtojn de ĉiuj" ktp.

La maljuna konsistoria konsilanto estis viro, kies revoj etendis sin super vastaj horizontoj. Li opinias, ke oni ne rajtas dubi, ke Dio certe povas "ne nur realigi tian ŝtaton sed ankaŭ por ĉiam konservi ĝin per rimedoj kaj institucioj, kiujn ni eble ankoraŭ ne povas imagi, same kiel niaj prapatroj ne povis ekpensi pri la multspecaj utilaj inventoj, aranĝoj kaj preparaĵoj, kiuj en niaj tagoj tiom rapide sekvas unu al alian, kvazaŭ ili estus elvokataj per sorĉbastono: kiam tio, kio pasintjare estis rigardata neeble, ebligis ĉijare; kiam tiel ofte estas aŭdate: "Kiu kuraĝas decidi, kiom longe estos eble por la homa intelekto plivastigi la inventojn?" — jes, ke Dio certe povas en tia ŝtato direkti sian homaron al tia grado de perfekteco, en kiu milito estos tiel por eterne ekzilita, ke ĝi kun ĉiuj siaj teruroj kaj malfeliĉoj estos konata nur el la antaŭtempaj analoj."

Kiel la aŭtoro diras, kio estis neeble pasintjare, tio povas ebligi ĉijare, aŭ por diri tion alimaniere: kio en la pasinta jarcento estis signata kiel plej sensenca utopio, tio en nia jarcento povos fariĝi viva realaĵo.



La ideo pri la unuigita Eŭropo do ne estas eltrovaĵo de niaj tagoj sed jam antaŭ cent jaroj prezentita de viro el la nordo.

Mi devas tamen aldoni, ke mi antaŭ nelonge en iu dana ĵurnalo legis jenan informon (subskribitan E. V.)

"Oni parolas pri la unuigitaj ŝtatoj de Eŭropo. Sed estas erare kredi, ke tiu penso estas ideo de la postmilita tempo kaj naskita de ĝia mizero. Mi memoras, ke mi foje en la mortĉambro de Victor Hugo en Parizo vidis en vitra elmontrujo malgrandan paperslipon, sur kiu staris kun lia karakteriza skribo: "Mi reprezentas tiun partion, kiu ankoraŭ ne ekzistas: la revolucion-civilizacian partion. Tiu partio decidis pri la dudeka jarcento. De tiu partio unuc devenos la unuigitaj ŝtatoj de Eŭropo kaj poste la unuigitaj ŝtatoj de la mondo. V. Hugo."

La fama franca poeto naskiĝis 1802 kaj mortis 1885, li do estis pli juna samtempulo de Bjerregaard. Sed kiu el la du pli frue elsendis la penson, la franco aŭ la dano? Laŭ mia scio Bjerregaard almenaŭ estis la unua, kiu per la preso esprimis siajn pensojn pri la nun tiom aktuala temo. Sed Hugo tute konsekvence plilongigis la linion de Eŭropo ĝis la tuta tero. Jam nun la demando pri la unuigitaj ŝtatoj de la tutmondo estas traktata, kaj momente la ligo "Unu Mondo" nombras 21 sekciojn el kiuj 8 ekster Eŭropo. La realiĝon de belega revo oni jam vidas ĉe la fora horizonto.

## Piccard en la marprofundo

De K. WILGENHOF

Inter ni teranoj troviĝas persono, kiu estos en la kulmina punkto de sia vivo, kiam li estos atinginta la plej malaltan punkton, kiun homo iam atingis. Tiu persono estas profesoro Auguste Piccard, la svisa fizikisto, kiu famiĝis pro siaj stratosferaj veturoj. Post la alteniroj li revis pri alia problemo, nome pri vizito al la profundo de la oceano. Per metala sfero li volas malleviĝi en la akvo ĝis profundo de proksimume 4.000 metroj.

Piccard estas ne la unua, kiu tiel malleviĝas en la oceano. Jam en 1934 William Beebe, usona biologo, kelkfoje faris tion, kaj li atingis profundon de 900 metroj sub la marnivelo. Li uzis grandan metalvandan sferon, kiun li nomis batisfero (bathysphere). En ĝi estis spaco por du personoj kaj kelkaj sciencaj instrumentoj. En la vando troviĝis du malgrandaj fenestroj kun dikaj specialaj vitroj. Tra ili Beebe kaj lia kunulo povis observi la ĉirkaŭaĵon de la sfero. Ili devis uzi fortan lampon, ĉar la suna lumo penetras ne pli ol kelkcent metrojn en la maron. Je 500 metroj sub la marsurfaco lumo estas apenaŭ rimarkobla. Pli profunde regas absoluta mallumo. Tial multaj estaĵoj vivantaj en tiuj profundoj kunportas sian propran lumon. Beebe skribis pri tio: "Plurfoje la lumo, kiun elsendis iu organismo nekonata al mi, estis tiom forta, ke mi momenton blindiĝis pro ĝi. Ofte ni estis ĉirkaŭataj de tiom da lumoj, ke oni senvole ekpensis pri stelplena ĉielo.

La batisfero de Beebe havis malavantaĝojn. Ĝi pendis per longa kablo de argano staranta sur ŝipo. La ondoj, kiuj movis la ŝipon, tial samtempe influis la moviĝon de la batisfero. Tio signifas malagrablajn skuojn al instrumentoj je fotografado kaj observado. Krome la kablo portis ne nur la ŝtalan sferon sed ankaŭ sian propran pezon. Tiu pezo estas granda, ĉar la kablo devas esti fortika. El tio sekvas, ke oni, celante al pli grandaj profundoj, fine bezonus kablaron, kiu rompiĝis pro la propra pezo. La danĝero de kablrompiĝo ekzistas cetere ĉiam, do ankaŭ la eblo, ke la sfero kun enhavo falas profunden neniam revenonte.

Konsiderinte tiujn faktojn profesoro Piccard decidis fari aparaton, kiu similas aerostaton. Aerostato estas balono, kiu entenas gason pli malpezan ol la aero. Pro sia malpezeco la aerostato levas sin kaj povas veturi super la tero. Laŭ tiu ekzemplo Piccard igis konstrui grandan balonon fiksoitan al la supro de la sfero kun la observantoj. La balonon oni plenigos per speco de benzino pli malpeza ol akvo. Per kunporto de balasto la balono malleviĝos. Malfiksinte la balaston oni povos reveni al la marnivelo. Jen la principa ideo. La balono povas libere movi sin en la akvo. Tial profesoro Piccard nomis ĝin "la libera balono de la oceano".



Pensante pri submara balono oni troviĝis antaŭ kelkaj malfacilaĵoj. En la profundo de la maro la premo de la akvo sur la balono kaj la sfero estas grandega. La vandoj devas esti tiom fortikaj, ke ili povas rezisti al premo de eventuale pli ol 400 kg sur 1 cm<sup>2</sup>. Trueto kiom ajn malgranda estigus katastrofon. La enpenetranta akvoŝpruco efikus kiel grenado, kaj la rapidege grandiganta premo de aero kaj akvo en la sfero tuj frakasus la homajn korpojn. Apenaŭ estas bezonate aserti, ke oni kun granda zorgo kaj multa atento konstruis la sferon.

Ĝia diametro estas proksimume 2 m, kaj la vando estas proksimume 9 cm dika. Oni provis ĝin per premo de pli ol 1.000 kg sur cm<sup>2</sup>. Unufoje la aparato de la premprovaj rompiĝis, kaj fortega oleŝpruco rompis kupran platon pli ol 2 cm dika. Tio bone ilustras la fortegojn, kiuj efikos al la vando de la sfero. La fenestroj konsistas el speciala vitrosimila materialo taŭga kontraŭ grandaj premoj.

Alia problemo estis la moviĝo de la balono tuj super la oceanfundo. Veturi per radoj, simile al ĉaro, ne estas eble. La fundo povas esti tro malebena. Montetoj, krustoj, abismoj, deklivoj, kreskaĵoj povas malebligi veturadon. Piccard preferis alian solvon nome trenkablono. Kiam oni proksimiĝas al la marfundo, parto de kablo pendanta de la sfero kuŝiĝas sur la fundo. La pezo de tiu parto ne plu influas la pezon de la tuta balono. Oni povas aranĝi tion tiel, ke la malpliiganta tuta pezo de la veturaĵo konsistanta el la balono kaj ĝiaj apartaĵoj sufiĉas por ŝvebigi la balonon laŭ konstanta nivelo.

Se la balono moviĝanta en iu direkto proksimiĝas al monteto, la fundotuŝanta kabloparto plilongiĝas kaj la malplipeziĝanta veturaĵo plialtiĝas. Tio daŭras, ĝis la balono atingas la supron. Poste la fundotuŝanta kablo emas malplilongiĝi, kaj la balono malrapide malaltiĝas laŭ la deklivo. Tiel la balono povas transiri ĉiujn malebenaĵojn. Ĉar la kablo treniĝas sur la fundo, oni nomas ĝin trenkablo.

Du malgrandaj motoroj kun helicoj movas la balonon en horizontala direkto. Ili estas malfortaj, havigas do nur malgrandan rapidon al la balono. Oni tiel aranĝas por ŝpari elektron, por ne fortimigi la marprofundajn bestojn per rapide

turniĝantaj helicoj kaj por povi bone observi dum la malrapida iro.

Kiam Piccard kaj lia kunulo post sufiĉa esplorado aŭ pro ia devigo volas leviĝi, ili devas forigi balaston. Ili kompreneble ne povas malfermi pordeton por elĵeti ĝin. Tial oni elpensis specialan metodon. La balasto konsistas el feraĵo tenata al la sfero per elektromagnetoj. La pezo de la feraĵo estas tia, ke la balono plus la feraĵo pezas iom pli ol akvo.

Se okazus ia akcidento, oni povus tuj malfiksi la tutan balaston. Tiam la balono rapide irus returne al la marsurfaco. Krome diversaj signaliloj montrus, kie la balono estus. Ujoj kun koloraĵo malfermiĝas, kiam ili atingas la marnivelon, kie ili ruĝigas grandan surfacon. Alia signalilo disvastigas fumon tage kaj ruĝan lumon nokte. Per tiuj helpiloj aeroplanoj povus trovi la balonon en la vasta oceano.

Se la trenkablo fiksiĝas al io surfunda, oni povas per kurentohaltigo malfiksi ĝin de la sfero, ĉar ankaŭ ĝi estas elektromagnete tenata.

En la ĉiama tute nigra nokto de la profundo oni bezonas fortan lumon. Tial la profesoro provizis sian balonon per kelkaj grandaj lampoj, kiuj povas prilumi la ĉirkaŭaĵon. Kompreneble li instalas diversajn sciencajn instrumentojn en la sfero. Plue necesas aparato liveranta oksigenon por la spirado de la sferanoj. Profesoro Piccard disponas novan sistemon de telekomunikado inter la sfero kaj la surmara ŝipo, de kiu la balono deiris. Pri tiu sistemo oni malmulte publikigis.

La loko, kie la malsupreniroj okazos, estas zorge elektita. Post studoj pri klimato kaj vetero profesoro Piccard elektis la golfon de Gvinco (okcidenta Afriko). Tie la vetero kutime estas stabila kaj trankvila. La marsurfaco estas sufiĉe kvicita kaj estas negranda la eventualo de subitaj veterŝanĝoj, kiuj povas prokrastigi la eksperimenton aŭ ĝeni la balonon post la reiro.

Kiu akompanos profesoron Piccard dum liaj profundegaj vojaĝoj? Pluraj prezentis sin, kaj verŝajne diversaj scienculoj estos laŭvice liaj kunuloj. Ankaŭ lia fidela helpanto dro Max. Cosijns estos inter ili.

Kiam la homaro aŭdos pri la okazigo de la malsupreniroj, ĝi



sendube spirite partoprenos la kuraĝan entreprenon. Oni avide legos kaj aŭskultos la raportojn pri la aventuro.

Verŝajne estas, ke Auguste Piccard staras antaŭ baldaŭa atingo de grandioza celo. Mi citas la vortojn de Cl. Francis Boeuff, la oceanologo, kiu skribis en la pariza revuo *Les Nouvelles Littéraires*: "Kion ni deziru al Piccard? Ĉu bonŝanca feliĉon? Ne, ĉar temas ne pri riska entrepreno sed pri afero, ĉe kiu ĉiaj danĝeroj estas antaŭatentitaj kaj per precizaj kaj sciencaj preparoj evititaj. Kaj tamen — feliĉon. Ĉar li sentas sin feliĉa, nun kiam lia revo estas realigota."

Tio estis skribata en 1946, sed la revo ankoraŭ ne (majo 1948) realiĝis. Laŭ ĵurnalinformoj malbona vetero devigis al ripeta prokrasto ĝis 1948. Eble la vertikala marveturo estos ĵus okazinta, kiam vi legos tion ĉi.

## De kie venis la polinezianoj?

De BRENDON CLARK

### O R I E N T A D O

Andaman Ins. (Bengala Golfo): 11° N, 92° ORiente.  
Chatham Ins. (N. Z.): 44° S, 175° OKcidente.  
Cook Ins. (apud Tahiti): 20° S, 150° OK.  
Ellice Ins.: 10° S, 178° OR.  
Fueglanoj (ĉe Terra del Fuego): apud K. Korno.  
Gilbert Ins.: 1° N, 171° OR.  
Hawaii Ins.: 20° N, 156° OK.  
Indonezio: la insula ĉeno norde de Aŭstralio.  
Kermadec Ins. (N. Z.): 31° S, 179° OK.  
Mangareva (S. Tuamotu): 23° S, 135° OK.  
Markezaj Ins.: 10° S, 140° OK.  
Papua: la sudorienta parto de Nova Gvineo, norde de Aŭstralio.  
Paska Ins.: 25° S, 110° OK.  
Paumotu (aŭ, Tuamotu) Insularo: 18° S, 140° OK.  
Phoenix Ins.: 5° S, 171° OK.  
Pukapuka Ins.: en N. Orienta Tuamotu.  
Rarafonga Ins. (Cook Ins.): 21° S, 160° OK.  
Tahiti: 18° S, 150° OK.  
Tonga Ins.: 20° S, 175° OK.  
Tuamotu Ins.: 18° S, 140° OK.  
Yap Ins.: 10° N, 138° OR.

Rimarkigo: Interpunteio, uzo de majuskloj kaj diversaj esprimmanieroj parte diferencas de la ordinara uzmaniero en MR. La aŭtoro malpermesis ŝanĝojn krom en kelkaj okazoj. — Red.

La supra orientado estas farita pro la diversaj nomoj de iuj insuloj (eĉ en sama lingvo) kaj pro la malgrandeco de aliaj. La formato de MR permesus nur malgrandan karton. Tial la leganto prefere uzu iun atlason.

\*

La vorto Polinezio signifas Multaj insuloj. Se oni konstruos sur la markarto triangulon, kiu enhavos la insulojn Hawaii ĉe la norda angulo, Nov-Zelandon ĉe la sudokcidenta kaj la Paskan Insulon ĉe la sudorienta, tiu estos la *Polinezia Triangulo*. Ĉiu insulo en tiu triangulo nun estas, aŭ antaŭe estis, surloĝata de Polinezianoj kiuj parolas dialektojn de la sama lingvo kaj observas proksimume la samajn morojn.

Antaŭ la milito, Nov-Zelando respondis pri la bonfarto de pr. 150.000 (t. e. du trionoj) de la Polinezianoj en la Triangulo. Britujo, Francujo, Usono kaj Ĉilio respondis pri la cetera triono.

La haŭto de la Polinezianoj estas ore bruna, kaj multe pli pala, ol la haŭto de la ceteraj indiĝenaj rasoj en la Pacifika regiono. La hararo estas nigra kaj ondoforma, sed ne bukta. La lipoj estas mezdikaj, la kapo longa, kaj la nazo mallarĝa; la dentoj estas tre regulaj, kaj ebure blankaj. La staturo estas granda kaj fortika. Ofte la haŭto estas kolorigita aŭ tatuita, sed tiu kutimo ne estas universala, kaj eble ne tre antikva. La Maorioj enpikis la tatuon, kiun ili nomis *moko*; 'tatuoj' estas Melanezia vorto — la Polinezianoj ne uzas ĝin. La unua celo estis timigi la malamikojn; sed poste la Maorioj uzis la *moko* kiel registron de siaj militfaroj kaj kuraĝo, kaj ĉiu spiralo, ĉiu marketo, akiris precizan signifon. Nuntempe, la kutimo preskaŭ mortis, kaj oni vidas la enpikitajn spiralojn nur sur la mentonoj de la tre maljunaj gemaorioj.

En la Polineziaj lingvoj la vokaloj estas kvin, kiel en Esperanto, kaj la konsonantoj sep — dekdu; ne ekzistas duoblaj konsonantoj (tr, pl, ktp) kaj ĉiu silabo finiĝas per vokalo. Pro la simpleco de la vokalo-konsonanta interrilato, tre diversaj dialektoj ne estas eblaj. La ŝanĝigo inter la dialektoj sekvas konatajn leĝojn; sekve, kiu lernas iun dialekton, povas elpensi la ceterajn. La avantaĝo de tiu dialekta simileco estas, ke oni povas des pli facile studi kaj kompari la mitojn kaj legendojn



de la tuta raso, malgraŭ la diverseco de la lokoj. Granda simil-eco ekzistas inter la kredoj kaj tradicioj de grupoj disigitaj de jarcentoj kaj mejlmiloj.

La plej konata legendo de la Maorioj diras, ke ili venis al Nov-Zelando de la netrovebla insulo Hawaiki; sed tiu legendo troviĝas ĉe preskaŭ ĉiu Polinezia grupo, kaj la nuna klarigo estas, ke ili donis tiun nomon al la plej granda insulo en ĉiu insularo, kompreneble kun dialektaj ŝanĝoj, ekz.: Hawaii, Savai'i, Avaiki, Hawaiki; S-ro S. Percy Smith, fondinto de la Polinezia Societo, diras ke la vorto signifas 'Malgranda Ĉeflando' kaj devenas de hinda vorto. La Maoria *Hakaiki* estas plej kredeble la insulo Raratonga.

La Polinezianoj ne sciis ian skribarton. Ili lernis parkere la legendojn, historiojn, kantojn kaj geneologiojn. Sed elstara inter iliaj kapabloj estis talento por la lignogravura arto, kiu atingis sian plej altan nivelon ĉe la Maorioj. Tiuj ornamis la kanotojn, domojn, ujojn kaj ilojn per la plej belaj kaj plej malsimplaj kunmetoj de spiraloj, oblikvaj linioj, retaĵoj, malsulkoj, kaj kvazaŭhomaj figuroj. (La religia kredo malpermesis la precizan imiton de la homa korpo.) Antaŭ ol meti la ĉizilon al la ligno, la gravuristo, kiu estis ankaŭ sanktulo, kaŝis sin en la arbaro dum tutaj semajnoj, ĝis li fine elpensis detale kaj en la kapo la tutan desegnon.

La raso estis (ĉar mi traktas pri antikvaj tempoj) kuraĝa kaj riskema, kaj scivola pri aliaj landoj. Ili estis lertegaj navigistoj, iom komprenante la movadon de la steloj, la direkton de la marfluoj, la sezonojn de la ventoj, kaj la konduton de la fiŝoj kaj la marbirdoj. Ili konstruis markartojn el krucigitaj kanaĵoj kaj montris la pozicion de insuloj per alfiksitaj ŝtonetoj aŭ konkoj. Nenia distanco timigis ilin, nenia ŝtormo venkis ilian riskemon.

Ĉirkaŭ la hejma insulo ili ofte uzis mezgrandajn kanotojn kun flanka floso; sed por transmigri la oceanojn ili uzis specon de grandega duobla kanoto. Ĝi havis longecon ĝis 35 metroj, kaj ĝi povis enporti ĝis 140 homojn. Ĉe iuj el la duoblaj kanotoj, oni konstruis kabanon kajuton sur la transplanko kiu kunigas la du kanotojn. Por provizi dormspacon, ili starigis

regulajn gardperiodojn. Ili ŝajne formigris de la origina lando antaŭ la trovo de metaloj, ĉar ili dehakis la arbojn kaj konstruis la kanotojn per iloj nur el ŝtono kaj osto. La multajn tabulplatojn ili tre manlerte kunligis, kudrante ĉiun al la pli malsupra per ŝnuro. Tiujn ili irigis tra truoj, kiujn ili boris en la elstarajn malsulkojn ĉe la interna flanko de la tabuloj, tiel konservante la eksteran belaspekton de la kanoto. Transtraboj ligitaj sur la suprajn partojn firmigis la ŝipon.

Ili portis volojn el plektita mataĵo, kaj iuj tradicioj mencias kanotojn kun tri mastoj; sed ĉar ili ne povis aliflankigi la velon kontraŭvente, ili transmetis ĝin de la antaŭaĵo ĝis la postaĵo, kaj tiu sekve fariĝis la nova antaŭaĵo. Modera rapideco estis po sep mejloj ĉiuhore. En malbona vetero ili alfiksis ŝirmilojn kontraŭ la fluganta ŝaŭmo; dum ŝtormo ili drivis de naĝankro, kaj delasis pli pezan ankron ĉe la postaĵo por plialtigi la bekton. Manke de vento, ili uzis dumetrajn pintformajn padeilojn. Oni kalkulis, ke ili povis krozi pli ol 4.000 km senhalte. Ili direktis la kanoton per ega padeilo al kiu ili kutime donis personan nomon. Kiam ĉiuj padeis, la sanktuloj kontrolis kaj regis la ritmon per kanotokantoj.

Inter si, la Polinezianoj estis mildaj kaj bonkoraj. Ili amis la familion per dolĉa kaj forta amo, kaj al siaj amikoj ili estis malavaraj kaj fidelaj. Ili ĝuis kanti kaj ridi, kaj ili alte taksis la poezion kaj la oratoradon, ĉar iliaj voĉoj estis belaj kaj ilia lingvo muzikoplana. Terura estis la ŝanĝiĝo, kiam ili iris kontraŭ la malamikojn. Al tiuj ili estis tute necedemaj kaj senkompataj; kiujn ili ne sklavigis, tiujn ili mortigis. Tiuj, kiujn ili sklavigis, perdis por ĉiam la honoron, eĉ en la propra hejmo; tiujn, kiujn ili mortigis, ofte ili manĝis — ne pro viandomanko, sed por des pli senhonorigi ilin. La kapojn de la malamikoj ili fumaĵis; kaj kiam la unuaj Eŭropanoj vizitis Nov-Zelandon kaj komencis aĉeti tiajn kapojn por la muzeoj, la Maorioj tatus per *moko* la vizaĝojn de sklavo kvazaŭ tiuj estus ĉefoj, mortigis ilin, kaj vendis la kapojn por pli alta prezo. Kiam Nov-Zelando fariĝis Brita kolonio, oni ĉesigis tiun abomenindan kutimon.



### *La Polinezia Enigmo.*

Oni kutime klasigas la unuajn homojn de la mondo laŭ tri grupoj, nome: Mongoloidoj, Negroidoj, Eŭropanidoj. La ĉefa trajto de la Mongoloida grupo estas la haŭtfaldaĵo kiu kovras la larmtubeton ĉe la angulo de la okuloj kaj de la Negroida, la larĝa nazo kaj la bukla hararo. Ĉiun alian homtipon oni nomas, pro oportuneco, Eŭropanida. La tri grupoj havis originon kred-eble en Centra aŭ Okcidenta Azio.

La Mongoloida grupo migris orienten; kaj voje de la Aleŭtaj Insuloj ili transiris 'piedseke' en Nordan Amerikon. De tie, la surlanda disvastiĝo de la raso ĝis Kapo Korno estis konsekvenca sekvo.

La Negroida grupo disiĝis laŭ du subgrupoj. Unu, la Kontinenta Negroida subgrupo, migris en Afrikon. La alia, la Oceana Negroida, vagis orienten; kaj la puŝado de sekvantaj popoloj pelis ilin laŭ la Azia Koridoro ĝis la Pacifika Oceano. Ĉiu negroida subgrupo havis pigmean, aŭ negretan, branĉon; kaj oni kredas, ke la negreta branĉo de la Oceana Negroida grupo estas la unua grupo forpuŝita de la Azia kontinento. Ili estas flankenpremitaj de aliaj popolondoj, kaj nuntempe post-vivas sur la insulo Andaman (apud Hindujo), sur la Malaja Duoninsulo, kaj sur la montoj de la Filipinaj Insuloj kaj Nova Gvineo.

Post ili tra la Azia Koridoro (laŭ la eminenta Maoria klerulo, D-ro Peter Buck, antaŭe Direktoro de Maoria Higieno en N. -Z., kaj nuntempe Direktoro de la Bernice P. Bishop Muzeo ĉe Honolulu), venis la Aŭstraliaj indiĝenoj, kiuj atingis al Nova Gvineo kaj transiris en Aŭstralion. Ili havis Dravidan devenon, kaj ili estas parencaj al la Vedoj en Cejlono. La hararo estas rekta aŭ onda, sed neniam bukla aŭ lansimila. "Malgraŭ ilia nigra koloro," skribas D-ro Buck, "scienca esplorado pri iliaj sango-grupoj pruvas, ke ili tute ne estas negroidaj, sed ke iliaj plej-parencaj troviĝas inter la rasoj de la norda kaj okcidenta partoj de la Mezmarĝa regiono."

Post la Aŭstraliaj indiĝenoj venis la Oceana Negroidoj, kiuj, amasiĝante en N. Gvineo, forpelis la negretojn en la montojn. Subgrupo de tiuj Negroidoj vagadis laŭ la ĉeno de kontinentaj

insuloj kiujn ni nun nomas Melanezio (Insuloj de la Nigra Popolo), sudoriente de N. Gvineo. Tiujn, kiuj restadis en Sud-orienta N. Gvineo, ni nomas Papuanoj; tiujn, kiuj pluen vojaĝis, ni nomas Melanezianoj. Surtere, kaj per mallongaj marvojaĝoj, la Melanezianoj atingis ĝis Flĝio. Iuj el la Melanezianoj vojaĝis sudokcidenten ĝis la orienta marbordo de Aŭstralio, sekvis la teron suden ĝis Bass Markolo, transiris tiun, kaj ekloĝis en Tasmanio. Sekve, la Tasmaniaj indiĝenoj (nun elmortintaj) havis nenian parencecon kun la Aŭstraliaj indiĝenoj.

La unuaj Maorioj kiuj vizitis Nov-Zelandon, ĉirkaŭ 950 P. K. trovis la landon senhoma, sed tiuj kiuj venis dum la granda migrado en 1350 trovis alian rason kiun ili nomis Moriuri, aŭ Marauwiwi, kaj kiun ni nomas Moriori. Tiujn la pli viglaj Maorioj aŭ mortigis aŭ sklavigis, kaj la lasta pursanga Moriori mortis ĉe la Chatham Ins. dum 1933. Pri tiu raso ni scias nur mal-multon.

La Eŭropanidoj migris de la Azia centro okcidenten en Eŭropon, kaj specoj ekzistas en Hindujo, Apuda Azio, kaj Norda Afriko. Kun escepto de la Aŭstraliaj indiĝenoj kaj la egale enigmaj *Ainu* en Japanujo, la Eŭropanidoj ŝajne ne partoprenis la plej fruan enloĝadon de la Pacifikaj marbordoj, kaj tiutempe la insuloj de tiu oceano restis tute senhomaj kaj nekronataj. Ĉiuj ĉirkaŭloĝantaj popoloj de la Pacifiko tiam estis *teramantoj*; kaj neniam dum la periodo de homa migrado ekzistis inter tiuj insuloj ia facila vojo por la piedirantoj. La misteroj, do, sin prezentas jene: De kie venis la Polinezianoj, kaj per kiu vojo ili trairis la Negroidan aŭ Mongoloidan teramantajn rasojn kaj ĉirkaŭis la Pacifikan Oceanon, kaj tamen preskaŭ tute retenis la propran karakteron, la propran ore brunan koloron, la propran lingvon, la proprajn tradiciojn?

### *Kelkaj Teorioj.*

Ĝis nun oni plej ĝenerale akceptis la teorion, ke la Polinezianoj devenis de regiono apud la Kaŭkazaj Montoj, migradis sudorienten tra Hindujo kaj Indonezio, kaj eniris en la Pacifikon, aŭ voje de Java en Malajo (la Suda Vojo), aŭ voje de Mikronezio en la Norda Pacifiko (la Norda Vojo).



Sir George Grey\* atentigas nin, ke la Polinezianoj vojaĝis ne por komerco, sed ĉar ŝtormoj forblovis ilin, aŭ ĉar ili serĉis novan hejmon, aŭ volis eviti ian venĝon, punon, homoferon aŭ nedeziratan edziĝon. Sekve, pro manko de nombroforto kaj armila supereco, kaj ĉar la ĉefa nutraĵo estis la fiŝo, ili evitis kontinentojn kaj serĉis insulojn.

Vol. I de la registare eldonita libro *Making New Zealand* montras per sagoj sur markarto la supozitajn vojojn de regiono iom norde de N. Gvineo: orienten al Hawaii; sudorienten kaj preterpasante sude de Samoa kaj norde de Tonga, ĝis Tahiti; nordorienten de Samoa, kaj norden de Tahiti, al Hawaii; okcidenten de Tahiti ĝis Nov-Zelando kaj la Chatham Ins. (Mi intence kontrastas al kaj ĝis.)

La argumentoj kiuj subtenas la Kaŭkazan Teorion estas multaj, kaj sin apogas ĉefe sur la lingvojn, la kredojn, la tradiciojn, kaj la gravurarton.

En sia libro *Hawaiki*, ekzemple, S. Percy Smith citas similecojn inter iuj Polineziaj kaj Sanskritaj vortoj. Prof. Macmillan Brown skribas: "Preskaŭ mi konkludas, ke la Polinezia lingvo reprezentas la pratempan formon de la Hindu-Eŭropa... Kaj la multaj vortoj kaj radikoj en la Japana lingvo, kaj eĉ pli en la Ainua, kiuj estas identaj kun Polineziaj vortoj, kaj kiuj estas samtempe Hindu-Eŭropaj, montras la vojon per kiu ĝi eniris en la Pacifikon."

La trifingra homfiguro en la gravurarto vidiĝas en Hindujo kaj en aliaj landoj. La broŝuro *Maori Carving* mencias, ke la formo kreskanta luno, kiu estas ofta ĉe la Maoria gravurarto, okazas ofte ankaŭ en Hindujo, precipe ĉe la supraj partoj de kanotoj.

La Polinezianoj kredas pri feinoj kiuj similas al feinoj de iuj Eŭropaj superstiĉoj: ili estas *blondaj*, malgrandaj, ofte bonfaremaj, kaj ili amas la muzikon kaj la dancadon. Laŭ Sir George Grey, Polinezianoj kredas ankaŭ pri pratempaj drakoj, kiujn mortigis antikvaj herooj; kaj tiuj legendoj estas preskaŭ identaj kun la Eŭropaj.

\* Eksguberniestro de Kapkolonio kaj Sudaŭstralio; la 4a guberniestro de Nov-Zelando, kaj poste la Cefministro; sistempe tre eminenta klerulo pri Polinezio.

En artikolo en *Polynesian Anthropological Studies*, E. S. Craighill Handy montras similecon — preskaŭ identecon — inter la simbola *Tiki* (malgranda figuraĵo) de la Polinezianoj, kaj la *linga* (phallos — seksa simbolo) de la antikva Deva Raja-kulto en suda Hindujo. Ambaŭ simbolas la evoluadon de la naturo dum sinsekvaj epokoj, el kosmo konsiderata kiel dualista. Tio estas la principo de la Sankhya-terio pri originoj en Hindujo, kaj la literaturo kiu devenis de tiu principo interrilatiĝas kun la adoro al Viŝnu; la Viŝnuadorantoj estis unu el la du grandaj sektoj de Hinduismo, portitaj en Indonezion dum la unua jarmilo de nia epoko.

Pri la Polinezia kulto de *Io* kiel Superega Estulo, li skribas: "*Io* estas la interna koraĵo, nemontrata sed fonto de ĉio; *Tane* estas la evidenta transiganto, kiu, simboligata per la phallos *Tiki*, estas dieca Naskiganto. Tio paralele similas al la instruado de la alia granda Hindu sektio de Ŝivaismo kiu regis en Indonezio kiam la Polineziaj antaŭuloj supozeble foriris de insulo en tiu regiono. Laŭ tiu instruado, Iŝvara estas la interna realaĵo aŭ eco de Ŝiva, kiun reprezentas la *linga* aŭ phallos kiel videbla simbolo."

#### *La Suda Vojo.*

La juĝisto Fornander skribas, ke la Maorioj venis de Java, forpelite per la Malaja invado. Kiam ili ekloĝis sur insulo, ili nomis ĝin *Hawa-iti*, aŭ *Hawa-iki*, memore al la antaŭa hejmo: "Malgranda Saba, aŭ Java'."

Laŭ D-ro Buck, la Suda Vojo (la vojo unue akceptita kiel ĝusta) serpentumis tra Indonezio, norden de N. Gvineo, kaj laŭ la orienta bordo de la Melanezia insulĉeno ĝis Fiĝio.

Sir George Grey montras similecojn ĉe lingvoj kaj kredoj inter la alie malsimilaj Polinezianoj kaj Melanezianoj. Li mencias, ke la Melanezianoj, la malpli lertaj navigistoj el la du rasoj, ŝajne heredis la kapablon kontraŭstari la malarion, kaj ke ĝenerale ili enloĝas tiujn insulojn kiuj estas malarie mal-sanigaj.

Tamen la duboj pri la Suda Vojo estis fruaj kaj multaj. Prof. J. Macmillan Brown sumigis ilin, demandante kiel tiome Kaŭ-



kaza popolo povis migri pli ol 6.500 km tra la Negroida kaj Melanczia regionoj, kaj kontraŭ la Sudorienta Konstanta Vento, por malrapidaj stadioj, generacion post generacio, kaj mem ne fariĝis videble Negroida? Li demandas, kial ili foriris de la produktemaj kaj tiutempe ankoraŭ ne multe enloĝataj insuloj de orienta Indonezio, por penetri en nekonatan maron; kaj, se ili ja vojaĝis de Indonezio, kial ili ne kunportis la semojn de la rizo?

Laŭ D-ro Buck, la Polinezia lingvo ne multon ĉerpis el la Melanezia (kiu estas multalitera kaj malsimpla), tiel ke la dialektoj estas preskaŭ apartaj lingvoj kaj oni nun kredas ke la komunaj vortoj en la du lingvoj rezultas el Polinezia migrado *okcidenten* en Melanczion, kaj ne inverse. Alia punkto de D-ro Buck estas, ke la Polinezianoj neniam uzis la pafarkon en milito, kvankam ĝi estis la ĉefa armilo de la Melanezianoj. Laŭ Grey, la Melanezianoj havis plenan scion, ne nur pri la pafarkarto, sed ankaŭ pri la uzo de venenaj sagoj; li aldonas, ke la simptomoj de la venenoj estas same kiel en Afriko. Strange estus, se la Polinezianoj pasigus kelke da generacioj inter la Melanezianoj kaj lernus nenion pri tia utila arto!

Grey mencias ankaŭ, ke la Melanczianoj bone komprenis la fajncan arton. Tiu arto estas tute nekonata de la Polinezianoj.

#### *La norda vojo.*

Ĝis nun, oni trovis plej kredebla la teorion, ke la Polinezianoj eniris en la Pacifikon voje de la insuloj de Mikronezio (la Malgrandaj Insuloj), nome voje de Yap, Palan kaj Karolinaj, kie la vojo branĉiĝis: iu branĉo iris al Hawaii; la alia, trairinte la Gilbert kaj Phoenix Insulojn, eniris en Polincion norde de Samoa. Mongoloidaj elementoj jam ensorbis la originajn popolojn de Mikronezio, sed ankoraŭ restas sufiĉe da Polineziaj vortoj por montri la direkton de ties migrado.

La subtenantaj faktoj estas imponaj. Pri la simileco inter la Polinezia lingvo, la Ainua en Japanujo, kaj la Hinda-Eŭropa, ni jam legis; F-ino Thompson trovis similecon inter la kraniaj mezuroj de la Maorioj kaj de la Ainu; la ŝtonĵetilo estas grava armilo en Mikronezio, kiel ankaŭ tra Polinezio; kaj kvankam

la Maorioj ne uzis la ĵetilojn, tamen oni trovis ĵetilŝtonojn ĉe la Kermadec Insuloj, apude norde de Nov-Zelando; la malsimpla kasko kiu ŝirmas la indiĝenojn de la Gilbert Ins. kontraŭ la ĵetilŝtonoj, troviĝas samforme en Centra Polinezio. Pri religiaj similecoj, Sir George Grey skribas:

"La Polinezianoj kredas, ke je la komenco de la mondo, reĝa raso de ĉefuloj naskiĝis de ilia ĉefa Dio, kiu apartiĝis de siaj idoj pro ties malbona konduto; ke tiuj ĉefuloj fariĝis la sola rimedo por komunikado kun la dioj kaj malbonaj spiritoj. Sekve tiuj ĉefuloj sanktiĝis; kaj tiu, kiu tuŝis ilin, aŭ kiu eĉ transiris ilian vojon, riskis katastrofon, malsanon, aŭ morton."

Grey rimarkigas, ke la institucio de la Mikado en Japanujo baziĝas sur similaj kredoj, kaj sugestias, ke tiu fakto meritas pluan esploradon. E. W. Gifford trovis, ke 27 elementoj de Tonga mitologio estas komunaj kun Mikronezio, kaj nur 10 kun Melanezio.

La Nordavoja Teorio, do, evitas la problemojn de la Sudavoja Teorio, kaj ankoraŭ allasas interrilaton inter Polinezio, Indonezio, Mikronezio, Japanujo kaj Hindujo. Sed ĝi lasas nesolvitaj iujn enigmojn kiujn eĉ la plej fruaj studentoj plene konstatis; kaj elstara inter tiuj enigmoj estas la interrilato de Polinezio kun la Amerika Kontinento.

#### *Kontaktoj kun*

Komence ne ekzistis forta kredo pri tia interrilato, precipe pro la malsimileco inter la lingvoj, kaj pro la grandega distanco (pli ol 6.500 km) kiu disigas orientan Polincion de la Amerika marbordo. Tamen eĉ Sir George Grey, antaŭ 50 jaroj, sentis ke ia interrilato nepre ekzistis inter ambaŭ rasoj de la Pacifiko, kaj tiuj de la okcidenta marbordo de Ameriko.

Li citas ekzemple la verkojn de Vasco Nunez, kiu transirante Amerikon de la Atlanta bordo ĝis la Pacifika, trovis 'negrojn' kies ĉeesto en la Sieroj estis neklarigebla. Ĉar la Afrikaj kanotoj ne taŭgis por longaj vojaĝoj, kaj ĉar la Karibaj rasoj tiam troviĝis sur la insuloj de la orienta marbordo de Ameriko, Grey konkludis, ke la 'negroj' estis Melanezianoj; kaj li eĉ sugestiis, ke la Meksikaj Indianoj kaj aliaj parencaj rasoj en Sudameriko,



almenaŭ parte devenis de la Polinczianoj kaj Melanezianoj. (La inversa alternativo ŝajne ne eniris en lian cerbon, aŭ li trovis ĝin neakceptinda.)

Li mencias la komunajn kutimojn pri homofero kaj kanibalismo; la komunan lernemon; la kantojn pri la militfaroj de la antaŭuloj; la komunan muzikamon. Laŭ De Solis (*Historio de la Venko de Meksiko*), la Meksikanoj havis flutojn el kano, kaj trumpetojn el konko, kiuj estas identaj (skribas Grey) kun la instrumentoj de la Polinezianoj. Kiam la Maoria princino Hinemoa, laŭ tre konata legendo, transnaĝis la lagon al sia amanto Tutanekai, tiu kaj amiko gvidis ŝin per muziko de fluto kaj konka trumpeto. Ankaŭ laŭ De Solis, la antikvaj Meksikanoj uzis specon de tamburo kiun ili faris el arbotrunko 'tiel malplenigita kaj maldikigita, ke ĝi respondis al frapo per bastono, tre malplaĉa sono.' Laŭ Grey, tiu tamburo estas identa kun la Polinezia tamburo kiun la Maorioj nomas *Te Pahu*.

Li citas el Helms (*Spanish Conquest in America*, Vol. II, p. 509): "La Meksikanoj dum la milito uzis la plej insultan lingvon antaŭ la malamikoj. Al la Tlaskalonoj ili ĵetis la rostitan karnon de ties kunuloj kaj de Hispanaj soldatoj, kaj kriegis: "Manĝu la karnon de tiuj diabloj, kaj de viaj fratoj, ĉar ni trosatiĝis per ĝi". Tium saman esprimadon uzis la Maorioj en precize similaj cirkonstancoj:

"Mi estas trosata per la sankta cerbo de Tukorehu; la karno de Hanauru ankoraŭ alteniĝas inter miaj dentoj." (Moteatea, p. 401). Nek la Meksikanoj nek la Polinezianoj manĝis la proprajn tribanojn, sed nur la mortigitajn malamikojn. Kanibalismo ne ekzistas en Madagaskaro; ĝi estas malofta en la okcidentaj insuloj de la Pacifiko; kaj ĝi daŭre pliiĝas ju pli oni alproksimiĝas al la plej orientaj lokoj atingitaj de la Polinezianoj — se oni allasas, ke ili enloĝis iujn partojn de la Pacifika Ameriko. Pro tio, Grey konkludas, ke la Polinezianoj akiris la kutimon vizitante la Amerikan marbordon. Kaj verdire, se la Polinezianoj devenis de raso kiu praktikas kanibalismen, oni rajtus atendi, ke la kanibalismo ekzistus tute tra Polinezio, kaj ne nur ĉe kelkaj lokoj.

Grey citas ankaŭ la Kalendarŝtonon en iu Meksika katedralo. La centra figuro de la suno en tiu ŝtono estas forme de virkapo

kun longepinta lango elpuŝita ĝuste kiel ĉe la Polineziaj figuraĵoj.

Fino Thompson en 1915—1917, kaj K. Wagner en 1937, trovis similecon inter la kraniaj mezuroj de la Maorioj kaj la Fuegianoj (apud K. Korno).

La batato (*Ipomea batatas*) sendube venis en Polinczion de Sudameriko. En la Kechua dialekto de Norda Peruo la nomo de tiu batato estas *kumar*. La Polinezianoj nomas ĝin *kumara*. D-ro Buck kalkulas ke ĝi estis en Hawaii antaŭ 1250, kaj en Nov-Zelando antaŭ 1350; sekve ne povas esti, ke la hispanoj distribuis ĝin en la Pacifiko. Nur la Polinczianoj mem povis alporti ĝin. Sekve, oni konkludis ke ili iutempe atingis al la Perua marbordo. Buck kalkulis, ke kun favora vento ili povus transvojaĝi la 6.500 km inter ekzemple la Markezaj Ins. kaj la marbordo de Norda Peruo en la daŭro de kvar semajnoj; sed ke tiaj vojaĝoj estus nur maloftaj. Li asertas, ke eĉ en la tropikoj, la okcidentaj ventoj regas dum jarkvarono, kaj ke la misiisto John Williams iufoje veliris orienten de Samoa ĝis Cook Ins., laŭ rekta vojo, kaj eĉ ne unu fojon aliflankigis la velon. Skunestroj diris al Buck, ke ili preferus esplori nekonatan maron kontraŭvente, por ke ili povu facile reiri, en la okazo se la provizaĵo elĉerpiĝus.

Prof. J. Macmillan Brown skribas, ke la ŝtonaj bustoj sur Paska Ins., kaj la ŝtonegaj statuoj sur Raivavai, Pitcairn kaj Hivaoa en la Markezaj, havas la plej fortan parencecon kun la statuoj sur la Pacifika marbordo de Sudameriko, kie troviĝas ankaŭ ŝtonega arkitekturo kiu similas al la podioj kaj kunvenejoj de la Polinezianoj.

O. F. Cook (Usono) kredas, ke la kokoso devenis de Sudameriko, kaj ke la homoj portis ĝin en la Pacifikon. Sed tiuokaze, demandas Macmillan Brown, kial la homoj ne kunportis samtempe la maizon, la tabakon kaj la terpomojn? La trovo, antaŭ nelonge, de malgranda sed vera kokoso en la triaepoka tavolo de Nov-Zelando, ŝajne montras la Pacifikan Oceanon kiel la hejmon de la kokoso.

Fine, ekzistas en Guayaquil (Ekvadoro) kaj Lambayeque (Peruo), tradicio pri jaduzantaj invadintoj; kaj oni trovis en tombo en Ekvadoro ŝtonan armilon, kiun, laŭ Prof. Macmillan



Brown, ĉiu Nov-Zelandano tuj rekonus kiel Maorian *mere* (tre konata piorforma batilo farita el bela verda ŝtono trovebla en la Suda Insulo de Nov-Zelando).

El tiaj faktoj naskiĝis la kredo, ke iam dum sia historio la Polinezianoj, kaj eble la Melanezianoj, vizitis la Amerikan marbordon.

#### *La Ekspedicio de Heyerdahl.*

Kiam la norvega scienculo, Thor Heyerdahl, kiu jam antaŭe esploris la Markezajn Insulojn en 1937—1938, proponis la ideon, ke la Polinezianoj ne vizitis Amerikon, sed devenis de tie en la Pacifikon, oni akceptis la teorion per amuzo kaj malkredo. Ili juĝis la flosojn de la antikvaj Indianoj maltaŭgaj por tiom longa vojaĝo.

Sed Heyerdahl kredis, ke la insuloj de Tuamotu (aŭ, Paumotu) estis komence enloĝitaj de Peruanoj kiuj flosis tien. Li juĝis malprava la teorion, ke la polinezianoj devenis de Azio, pro tio, ke ili ne posedas rizon, kaj ne komprenas fajncarton nek la teksilon. (Tamen, multaj insuloj ne taŭgas por la rizo, kaj ne havas argilon por la fajenco).

"Se Azio estus la devenloko, la plej fruaj tradicioj nepre enhavus memorojn pri la elefanto, kaj pri la iloj de tiu tempo," li diras. "Laŭ mia teorio, la Polinezianoj ne estas idoj de la Melanezianoj, sed iliaj kuzoj." (La teorio, ke la Polinezianoj estas idoj de la Melanezianoj, estas tute nekonata de mi. Eĉ la plej frua teorio, rilate al la Suda Voja, rekonas la evidentan diferencon inter la du rasoj.)

Li citas la faktojn kiujn mi pritraktis sub la antaŭa rubriko, kiel ankaŭ la legendon de la Inkaoj de Peruo pri blonduloj kun barboj kaj bluaĵoj, kiuj fine malaperis en la okcidentan duonsferon; la Polinezianoj rakontas pri similaj homoj kiuj unue loĝis la Pacifikon. (Ĉu eble Skandinavo? Iu Maoria tradicio aludas blondulojn kun bluaĵoj — kaj flugiloj ĉe la kapo.) De tiuj venis religio kies sundio estis *Tiki*.

Por pruvi, ke la Peruanoj ja povis atingi la insulojn de Polinezio per siaj flosoj, Heyerdahl kaj kvin kunuloj konstruis floson ĉiel similan al tiuj de la antikvaj Peruanoj. Ili mem dehakis

la balzajn ŝtupojn en la ĝangalo de Ekvadoro, kaj kunligis ilin per ŝnuroj. Ili konstruis ferdekon kaj kajuton el bambuo, kaj primitivajn kvadratan velon, direktilon, kaj remilojn. Ili alfiksis centrajn kilojn same kiel ĉe la pratempaj Peruaj flosoj. La flosa havis amplekson proksimume 15 × 6 m. Ili nomis ĝin Kon Tiki, laŭ la antikva sundio. Akvon ili portis en bambuaj kanoj; terpomojn kaj kokosojn sur la ferdeko. Krom tio, ili portis diversajn sciencajn instrumentojn por helpi la observadon kaj registri kion ili observas.

Ili foriris de Callao, la ĉefurbo de Peruo la 29-an de Apr. 1947, kaj vaporŝipo trenis ilin 150 mejlojn suden ĝis la Humboldta Marfluo. Poste de tiam, ili vojaĝis nur per la ventoj kaj la marfluoj. Ili kaptis flugfiŝojn, grandajn fiŝojn, kaj manĝeblajn krabojn. La fiŝojn ili sukcesis sekigi per la varma suno. Akvon ili kolektis okaze de ekpluvoj. Dum ŝtormoj la flosa naĝis bone, kaj la interno de la kajuto restis seka. Ili vojaĝis proksimume po 50 mejloj ĉiutage.

La vojaĝo finiĝis matene de la 7-a de Aŭgusto, kiam la flosa surteriĝis sur la Raroia Rifo en la Tuamotu Insularo. Ili do vojaĝis pli ol 6.500 km en la daŭro de iom pli ol tri monatoj, laŭ la samaj kondiĉoj kiel ĉe la antikvaj Peruanoj.

Poste, Heyerdahl diris ke la eksperimento plifortigis lian teorion, ke la Pacifikaj indiĝenoj estas idoj de la Indianoj de Norda kaj Suda Ameriko. Lia opinio, okazis du invadoj: iu de Peruo ĝis Tahiti, antaŭ pr. 1.500 jaroj, la alia de Brita Kolumbio ĝis Hawaii kaj Nov-Zelando, pr. 500 jarojn poste.

#### *Respondindaj Demandoj.*

Malgraŭ la sukceso kaj intereso de la Heyerdahl Ekspedicio, oni pli prudente volus ne troigi ĝian signifon: ĝi pravas nur, ke la antikvaj popoloj de Ameriko povis atingi la Pacifikajn Insulojn. Tio ne diras, ke ili tion faris, nek ke ili estis la prapatroj de la Polinezianoj.

Ekzemple, se la Tahitianoj venis de Peruo, kaj la Hawaiiianoj kaj Maorioj venis de Brita Kolumbio 500 jarojn poste (laŭ la teorio de Heyerdahl), kial la lingvoj sur tiuj insuloj estas preskaŭ samaj? Oni povas kompreni, ke la simpla Polinezia lingvo ne



multe ŝanĝiĝas sur izolitaj insuloj; sed oni ne povas kredi, ke sur kontinento enloĝata de diversaj rasoj, la lingvo de Peruo estis la sama en Brita Kolumbio, *500 jarojn poste!* Kaj kiel oni klarigas la similecojn inter la Polinezia kaj la Hindu-Eŭropa lingvoj?

Ĉar la Polinezia religio detale similas al eroj de Hinduismo, kiel ankaŭ al la religio de la antikvaj Peruanoj, ĉu ne estas pli kredeble (kaj des pli kredeble, kiam oni studas la mondkarton), ke la Polinezianoj estis perantoj inter Hinduoj kaj Peruo?

La kreskanta luno estas ofta en la gravurarto de Hinduoj kaj Polinezio; ĉu en Ameriko? La longopinta lango estas ofta en Polinezia gravurarto; ĉu ofta en Meksiko? Ĉu ne ŝajnas pli kredeble, ke la Polinezianoj enkondukis ĝin en Meksikon, ol ke ili forportis ĝin de tie? La dato kiun Heyerdahl proponas por la migrado el Brita Kolumbio ĝis Hawaii kaj Nov-Zelando (pr. 950) precipe akordas kun la dato de la alveno de la nunaj Maorioj al Nov-Zelando laŭ la Maoriaj tradicioj (pr. 950), sed tio ne lasas tempon por la longa migrado de Hawaii ĝis Nov-Zelando. Se tiu migrado okazis laŭkutime, ĝi bezonis kelke da generacioj, ĉar laŭ la signoj ĝi iris almenaŭ voje de la Markezaj Insuloj, Tahiti kaj Raratonga.

Se la prauloj de la Polinezianoj estis kanibala raso de Ameriko, kial la kanibalismo ne estis, pro tradicio, ĝenerala tute tra Polinezio? Se la Maorioj venis de Brita Kolumbio ĝis Nov-Zelando preskaŭ senhalte, kiel ili fariĝis kanibaloj?

La tradicio pri jaduzantaj invadintoj en Ekvadoro kaj Peruo, kaj la trovo en Ekvadoro de armilo simila al Maoria *mere*, pensigas, ĉu eble ankaŭ la Maorioj vizitis tiujn landojn dum la pasinta jarmilo? Mi ne konas ian legendon pri tia vojaĝo, sed la Suda Insulo de Nov-Zelando, kie la bela verdŝtono ankoraŭ troviĝas, situas en la regiono de la fortaj kaj konstantaj okcidentaj ventoj. Alia eblo estas, ke dum la unua jarcento de la Maoria okupado de Nov-Zelando, kiam ili ankoraŭ revizitis al *Hawaiki*, ili reportis kun si la verdŝtonajn armilojn kaj ornamajojn, kiuj fine vojaĝis de tie ĝis Ameriko pere de Polineziaj vizitantoj al tiu lando.

La argumentoj kontraŭ Indiana deveno preskaŭ ĉiel similas al la argumentoj kontraŭ Melanezia deveno. Krom lingvaj diferencoj, la Indianoj estis ĉasantoj, sed la Polinezianoj ne multe ĉasis; ili preferis fiŝkapti. Tute tra Ameriko oni uzis la pafarkon (kiu estis ankaŭ Mongola armilo), kaj en Sudameriko la venenajn sagojn; sed la Polinezianoj neniam militis per pafarko. Se ili kunportis de Ameriko *hejmlando* la kumaron kaj la kokoson, kial ili ne kunportis ankaŭ la terpomojn, la tabakon kaj la maizon? La respondo estas pli kredebla, ke ili estis nur vizitantoj al Ameriko, kaj ne indiĝenaj enloĝantoj.

Povas esti, mia opinio, ke la Polinezianoj kaj la Peruanoj renkontiĝis meze de la Pacifiko; kaj oni volonte kredas, ke la exploremaj Polinezianoj tuj sentis inklinton viziti la grandan hejmlandon de la Peruanoj.

Tamen la ekspedicio multe pensigas, kaj sendube ĝi kaŭzos revizion de la antaŭaj opinioj. Laŭ la vortoj de la Maoria proverbo:

Oni flankenmetis la malnovan reton; nova reto nun la fiŝojn serĉas.

Brendon Clark, Nov-Zelando.  
12-1-1948.

#### Bibliografio.

- Coming of the Maoris (Alveno de la M.) — A. W. Reed.  
Elĉerpajoj el Auckland Star (tagjurnalo) 1928 (verkitaj en 1893 de Sir George Grey, K. C. B.). Danke al la Publika Biblioteko ĉe Auckland.  
Enciklopedioj kaj diversaj verketoj.  
Hawaiki — S. Percy Smith.  
La Heyerdahl Ekspedicio (Raportoj en la tagjurnalo Nov-Zelanda Heroldo 1947. Danke al la Elĉerpaja Fako de la Heraldica oficejo. Journal of the Polynesia Society (Gazeto de la P. S.).  
Making New Zealand (Konstruante N.-Z.) — N. -Za Registaro.  
Maori Carving (Maoria Gravurarto).  
New Zealand — Reginald Horsley.  
Peoples and Problems of the Pacific, Vols. I & II (Popoloj kaj Problemoj de la P.) — Prof. J. Macmillan Brown.  
Polynesian Anthropological Studies — Polinezia Societo, Wellington, N. -Z.  
a. Physical Anthropology of the Maori-Moriari — H. Shapiro, Usona Muzeo de Naturscienco.  
b. Perspectives on Polynesian Religion — E. S. Craighill Handy.



## Lingvaj sugestoj De STELLAN ENGHOLM

Multaj esperantistoj jen kaj jen uzas vortojn kun nur proksimuma imago pri iliaj formo kaj signifo: "monoj", "periodike", "farmisto" anstataŭ terkulturisto aŭ bienulo, "konsternigi" anstataŭ konsterni. La nombro de fuŝuzataj vortoj estas ne malgranda. Ne nur komencantoj fuŝas sed ankaŭ homoj, kiuj uzis la lingvon dum jaroj kaj jardekoj.

Esperantisto, kiu respektas la lingvon kaj la ideojn, por kiuj ĝi estas rimedo, ne toleras tian fuŝon. Ĝi malutilas al la lingvo, malutilas al la movado.

Oni devas en vortaro aŭ vortaroj serĉi informon pri ĉiu vorto, pri kies formo kaj signifo oni ne estas tute certa. Tion devas atingi ĉiu, kiu volas meriti la nomon esperantisto. Grave estas kutimigi komencantojn al lingva memkontrolo.

Vortaroj ne estas perfektaj. Precipe nacilingvaj-esperantaj vortaroj havas pli aŭ malpli da mankoj. Ili ne informas, ĉu verboj estas transitivaj aŭ netransitivaj, ne donas kontentige da ekzemploj pri la uzo de la vortoj, kunmetitaj vortoj estas foje sence malklaraj aŭ mallerte faritaj. Tial pli informriĉa vortaro estas necesa por pli firma kaj pli detala konatiĝo kun la vortoj.

Ĉiu esperantisto, kiu serioze okupas sin pri la lingvo, devas nepre havi Plenan Vortaron. Ankaŭ en ĝi troviĝas eraroj, mankas iuj informoj. Tio tamen estas tute negrava kompare kun la fakto, ke ĝi sendube estas la plej korekta el ĉiuj vortaroj kaj krome multege pli informa ol ĉiuj aliaj. Ĝi estas universala fundamento por la vortuzo.

Ke oni uzu la vortojn korekte estas tiom elementa postulo, ke ĝi povas ŝajni ne menciinda. Tro multaj tamen ne atentis pri tiu postulo. Se oni ne atentis pri ĝi, oni ne povas uzi esperanton eĉ korekte, ankoraŭ malpli kun iom da stilo kaj persona vivo en la lingvo.

### *Frazkonstruado.*

Oni devas uzi vortarojn ne tiel, kiel oni uzas matematikajn tabelojn. Tio validas ankaŭ pri gramatikaj libroj.

Atento pri korekteco estas necesa. Sed se iu atentis sole pri korekteco, li povas produkti ekzemple jenan frazon, kiu eventuale povus esti laŭvorte fidela traduko el iu nacia lingvo:

"La viro estis longe iradinta kaj malsategis, kiam li alvenis al apudlago, brunkolorigita dometo." Mi preferus la frazon tiel: "La viro longe iris kaj estis tre malsata, kiam li venis al bruna dometo apud lago."

Kiam temas pri naciaj lingvoj fremdaj al ni, ni ordinare devas kontentiĝi per vortaro kaj gramatika korekteco (ofte nur proksimuma), kiam ni uzas ilin parole kaj skribe. Ni neniam atingas pli ol matematiktabelan rezulton. En esperanto la efektiva lingvoscio kaj lingvouzo komenciĝas ĉe tiu punkto, kiun ni en plej bona okazo povas nur atingi, kiam temas pri aliaj fremdaj lingvoj. Havante la lingvajn elementojn ni mem konstruas la lingvon, ni kulturis nian kapablon elekti kaj kombini vortojn, nian senton por precizeco kaj belaj esprimoj, akiras lingvan konscion. Sed tion ni atingas nur per propra aktiveco. Legado estas grava por akiri materialon por komparo kaj analizo. Ankoraŭ pli grave estas ke ni per skribado kulturis lingvan racion kaj lingvan fantazion.

Tio signifas personan rilaton al la lingvo, personan uzmanieron. Por ĝi oni ne devas kaj ne povas fiksi detalajn regulojn. Se oni tion povus fari, ĝi ne estus viva, libera evoluo. Tamen oni povas konstati kelkajn kvalitojn, kiuj ĝenerale apartenas al bona lingvo. Ekzemple devas troviĝi en ĝi nenio superflua, nek vortoj nek frazoj. Vortoj, propozicioj kaj frazoj devas tiel interrilati, ke la senco estas kiel eble plej facile kaptata kaj la impresoj cetere kiel eble plej plaĉa.

Mi nun donos kelkajn ekzemplojn pri esperantaj frazoj kiuj ŝajnas al mi nebonaj. Ili estas prenitaj el esperanta traduko. Miaj proponoj por ŝanĝo eble ne estas kontentigaj el traduka vidpunkto, ĉar mi ne povas kompari kun la originalo. Tio tamen ne gravas tie ĉi, ĉar la celo estas nur montri, kiel oni povas procedi por atingi pli bonan esperantan stilon. Mi ne analizos la ŝanĝojn. Tion vi certe povos mem fari. Per miaj ŝanĝoj mi ne sugestas, ke vi skribu tiel aŭ tiel laŭ miaj preferoj. Troviĝas ankaŭ aliaj solvoj certe same bonaj. Mi nur volas montri, kiel mi procedas. Tia ŝanĝo kaj reskribo de frazoj estas la plej bona



ekzercu por atingi bonan stilon. Ofte oni povas trovi plurajn solvojn pli malpli bonajn, kaj komparante ilin oni baldaŭ praktike trovas, kial tiu aŭ tiu esprimmaniero estas nebona aŭ preferinda.

Teksto: La bulvaroj estis okupataj per plezurerĉaj fremduloj, amasiĝintaj en Parizo el ĉiuj partoj de la mondo.

Ŝanĝo: La bulvarojn okupis plezurerĉaj fremduloj, kiuj amasiĝis en Parizo el ĉiuj partoj de la mondo.

Teksto: Mi vidis sangon guteti el la tranco de mi ĵus farita en la gorĝon.

Ŝanĝo: Mi vidis, ke sango gutetas el la tranĉo, kiun mi ĵus faris en la gorĝo.

Teksto: Mi permesis al Norström, kiu obeis min blinde de post sia reveno al Chantilly, akcepti aliajn pacientojn ol principojn ĝis nova ordono.

Ŝanĝo: Al Norström, kiu post sia reveno al Chantilly blinde obeis min, mi permesis ĝis nova ordono akcepti aliajn pacientojn ol principojn.

Teksto: Oni memoru nur la milojn kaj milojn da senhelpaj kazoj suferantaj pro nerva ŝoko aŭ traŭma neŭrozo dum la lasta milito kuracitaj kvazaŭ mirakle per tiu metodo.

Ŝanĝo: Oni memoru nur la milojn kaj milojn da senhelpaj kazoj, kiuj dum la lasta milito suferis pro nerva ŝoko aŭ traŭma neŭrozo, kaj kiuj per tiu metodo estis kvazaŭ mirakle kuracataj.

Teksto: Fiŝboatoj estis frakasitaj de ondegoj torentantaj trans la marbordon kaj forpelantaj pli ol mil homojn kaŭrantajn tie.

Ŝanĝo: Ondegoj torentis trans la marbordon, frakasis fiŝboatojn kaj forpelis pli ol mil homojn, kiuj kaŭris tie.

Gustoj kaj konceptoj estas diversaj, kaj diversaj esprimmanieroj povas esti bonaj, ĉiu en sia maniero. Se multaj homoj kune tiel analizas kaj konstruas frazojn, aperas tamen certa komuneco en la koncepto pri bonkvalitaj frazoj. La vortoj tiel interrilatu, ke oni kiel eble plej facile kaj klare perceptu la sencon, kaj la vortoj mem estu tiaj, ke ili donu kiel eble plej klaran kaj fortan pensobildon. Ankaŭ tiuj homoj, kiuj mem nur

malfacile aŭ eĉ mallerte konstruas frazojn, facile perceptas, kiu frazo estas la plej bona inter pluraj variantoj.

Rigardu ankoraŭfoje la lastan tekstekzemplon! Ĝi estas el la angla kaj ŝajnas laŭvorte tradukita. En la angla oni uzas multe da participoj. Tamen mi kredas, ke ankaŭ angloj trovas, ke la simplaj verboformoj kaj la simpligita esprimmaniero en la ŝanĝita frazo donas pli klarajn kaj pli fortajn pensobildojn pri la okazado.

## Literaturo

Freeman Wills Croft: Morto de trajno.

Tradukis Mason Stuttard.

Prezo 9 ŝ., sfr. 6 p.

Eldonis The Esperanto Publishing Co. Ltd, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Mendebila pogrando ĉe E. P. C., podetale ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe U. E. A., Rickmansworth.

Tiu ĉi libro estas la unua detektivromano, kiun mi legis post mia infanaĝo. Mi tiam legis tri aŭ kvar. Sekve mi tute ne estas kompetenta recenzi tian libron. Ĉar mi ne konas personon, al kiu mi povus konvene transdoni la taskon, mi tamen provos skribi pri ĝi.

Antaŭ ol mi komencis legi, mi timis, ke mi ne havos sufiĉe da persisto por tralegi libron, kiu neniom interesas min. La supozo montriĝis erara. Mi ne sentis emon formeti la libron, nur emis daŭrigi ĝis la fino, kaj mi nenion transsaltis. Sperto konfirmis tion, kion mi teorie konis de gravaj literaturistoj, kiuj defendas la detektivromanojn: ke detektivrakonto estas epika afero kun faktoj kaj agoj kaj kiu favorimpreso diferencas de multaj artpretendaj romanoj kun multaĝaj priskriboj kaj aliaj trolongaĝoj, kiuj estas tute sensencaj, evidente faritaj nur por la kvanto. Mi supozas, ke tiu epika nivelo estas diversa ĉe diversaj aŭtoroj. Ankaŭ faktojn kaj agojn oni povas tiel prezenti, ke la tuto fariĝas teda, senarta, ridinda. Morto de trajno



estas bonege verkita, kaj mi supozas, ke ĝi apartenas al la plej bonaj libroj de sia speco.

Alispecan romanon recenzisto povas fari pli interesa al la leganto per analiza rakonto pri la enhavo. En detektivromano troviĝas neniom da spirita enhavo por analizi, kaj mi supozas, ke pri la agado oni devas ne pli ol sugesti. La temo de *Morto de trajno* certe kontentigas eĉ tre altajn postulojn: germanaj spionado kaj sabotado en Anglujo pri varo, de kiu dependis venko aŭ perejo de Anglujo kaj la aliancanoj, kaj la centro de la medio estas la angla registaro. El nacilingvaj reklamoj por detektivromanoj mi ricevis la impreson, ke multaj aŭtoroj uzas murdojn kaj aliajn primitivajn agojn kiel temojn kaj intereso-streĉajn rimedojn. Ĉu ili faras tion pro mankanta inventokapablo ĉu pro oportuna adaptiĝo al la plej primitivaj sentoj ĉe kiel eble plej vasta publiko, tion mi ne scias. Estas plezuro konstati, ke *Morto de trajno* estas tute libera de tiaj primitivaĵoj. Mi tamen preskaŭ preterlasis diri tion, kio por amanto de detektivromanoj verŝajne estas la ĉefa afero: ĉu la rakonto estas streĉa. Por mi persone la matematika aranĝo de faktoj kaj agoj estas tute seninteresa ludo, ĉar ĝi havas, krom en sia verkarto, neniom da senco rilate al la efektiva vivo. Laŭ la verkarto mi tamen konkludas, ke *Morto de trajno* devas esti treege streĉa por ĉiuj, kiuj ŝatas tiajn pensoludojn. La aŭtoro evidente ankaŭ tre zorgas pri fidela redono de krimalfakaj procedoj.

Leganto mi ordinare tute forgesis pensi pri la lingvaj kvalitoj de la esperanta traduko. Mi supozas, ke tio estas sufiĉa laŭdo al la traduko. Ĉar ankoraŭ ne troviĝas iu internacia lingvo-analiza revuo, mi tamen prezentu kelkajn okaze rimarkitajn aferojn.

En la antaŭparolo de la tradukinto troviĝas jena esprimo: "oni devas povi legi ĝin". Estas ne kritiko sed nur ĝenerala lingva atentigo: multe da verboj kune ne sonas tute bone kaj iomete konfuzas la pensadon. Kredeble la peko kontraŭ la originalo estus pardonebla, se oni dirus "povu legi ĝin". — "Ek-maldormo", p. 9, ŝajnas al mi ne esti gajno por la stilo. Ĝi impresas kiel vortluda anstataŭigo de "vekiĝo". Se "dormo" estas esenca ideo en la originala vorto, "eldormiĝo" verŝajne estus

pli konvena en esperanto. — P. 141: "ĝi foriris dek ĝis dek kvin minutoj post la momento". Eble preseraro, sed eble la tradukinto opinias, ke "ĝis" forprenas la n-finaĵon de la tempa cirkonstancia vorto. Tamen "ĝis" apartenas nur al la nombro, kaj la tempovorto estas sen prepozicio. Do devus esti "minutojn". — P. 152: "dankas vin, superintendanton." Ĉar "superintendanton" servas kiel alparola vorto, ĝi devas ne havi objektan formon — sed eble tiu estas skriberaro. — En "preter la pordon", p. 201, n estas nebezonata. — P. 204: "rakonti ties historion". Ties rilatas al du virinoj. "Ties" estas tre abstrakta kaj tro multe uzata en certaj rondoj. Tie ĉi "iliajn" estus pli bona. — P. 256: "oni forrapidigis ilin en hospitalon". La esprimo en si mem, laŭ mia koncepto, signifas, ke oni igis ilin rapidi en hospitalon. La homoj, pri kiuj temas, tamen estis preskaŭ ĝismorte vunditaj, kaj oni urĝe aŭ rapide veturigis ilin en hospitalon. — La vorto "motociklo" verdire ekzistas en la rusa (motocikl) kaj eble en iu alia lingvo kaj krome en iuj esperantaj vortaroj. Mi opinias, ke malgraŭ tio estas prudente uzi la memklarigan esperantan vorton "motorciklo".

S. E.

Jozefo Joels: Panoramo de nia movado.  
Eldonis la aŭtoro, Caixa Postal 2-Lapa, Rio de Janeiro, Brazilo.  
Prezo 3 rpk.

Tiu Panoramo estas parolado, farita en la Asocio Esperantista de Rio de Janeiro, kaj ĝi okupas dekdu kaj duonan paĝojn en ofsete presita, bela broŝureto. Joels verve kaj emfaze parolas en tre facilflua lingvo por vekti entuziasmon kaj agemon ĉe la samideanoj. Li kritikis homojn, kiuj estas esperantistoj pli konfese ol age, kaj tiujn, kiuj per pli malpli naivaj rimedoj volas progresigi esperanton. Ĉar la parolado estas direktita al brazilaj esperantistoj, ĝi evidente havas lokan fonon. Tiu loka fono tamen estas loka ankaŭ en aliaj partoj de la mondo, pli malpli. La aŭtoro en tiu ĉi parolado ne montras rimedojn



por atingi pli bonan panoramon. Sed ankaŭ vokanta voĉo havas signifon.

Agostinho da Silva:  
Vivo de Nansen.  
La portugala literaturo.  
Eldonis Portugala Eldona Rondo.  
Prezo por 1 kajero 2 rpk.

Du novaj kajeroj en la konata serio. La vivo de Nansen estas koninda, kaj la priskribo estas konciza kaj bona. La portugala literaturo povas esti bona kiel konsultlibreto, sed pri la literaturo mem amaso da nomoj ne donas vivan impreson. La lingvo estas bona en ambaŭ. En Vivo de Nansen mi trovis esprimon, kiu estas almenaŭ dubesenca aŭ eĉ kontraŭsenca: "Nansen tuj metis sin flanken de ĉiuj, kiuj deziris fondi Ligon de Nacioj". La senco estas, ke li aliĝis al la flanko de...

Roterdama urbokoro.  
Eldonita de la Konsilejo por la Rekonstruo de Roterdamo.

Tute sensenca germana bombado en 1940 detruis la centron de Roterdamo. Ke la Konsilejo por la rekonstruo aperigas esperantan broŝuron pri la rekonstruoplanoj bone montras la pozicion de esperanto en Nederlando. La broŝuro enhavas tre interesajn artikolojn kaj same interesan statistikon, diagramojn kaj du kolorajn kartojn. Homoj ekster Nederlando povas senpage ricevi ĝin post peto al la Informservo de la "Konsilejo por Rekonstruo de Roterdamo", Coolsingel 107, ROTERDAMO, Nederlando. Tiu informservo ŝatas reciproke ricevi materialon pri konstru- kaj rekonstrulaboroj en la urbo aŭ lando de la ricevantoj. Tiuj ĉiukaze almenaŭ esprimu al la nomita oficejo sian opinion pri ĝia praktika uzado de esperanto.

Unualoke devas utiligi tiun broŝuron tiuj esperantistoj, kiuj rekte aŭ nerekte havas rilaton al urba konstruado. Se vi havas konatojn, kiuj ne estas esperantistoj sed okupiĝas pri tiaj aferoj, vi certe povas interesi ankaŭ ilin.

Jarlibro de U. E. A. 1948, Unua parto.  
Neaĉetebla, sed ricevebla nur de individuaj membroj de U. E. A.  
Aliĝiloj haveblaj ĉe Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo, aŭ ĉe ĝiaj diverslandaj perantoj.

Jen la unua jarlibro post la kunfandiĝo de IEL kaj UEA. Mankas spaco por pli detala preparolo. Cetere preskaŭ ĉiuj legantoj de MR verŝajne jam konatiĝis kun ĝi. Se ne, mi rekomendas ĝin al vi. Flanke de la delegitserva utilo la statistiko kaj multaj aliaj informoj donas al la membroj scion kaj superrigardon pri la movado, kiuj estas necesaj. La membronombro de UEA estis en la fino de 1947 16.005. Certa parto el tiu estas, se mi ĝuste komprenas, kalkulita pli ol unufoje (pro pli ol unuspeca membreco), sed kun konsidero al la postmilitaj malfacilaĵoj ankaŭ la efektiva nombro certe donas bonan ciferon. Kvalito estas pli grava ol kvanto, tamen ankaŭ kvanto estas necesa. Rilatiĝu la ciferon al la loĝantonombroj de landoj kaj mondpartoj! Multe da laboro restas.

Jarlibro de Sennacieca Asocio Tutmonda 1948.  
S. A. T., 67, avenue Gambetta, Paris 20.

"Ĝi estas modesta pro sia eteco, sed fiera pro la signifo de sia renaskiĝo", diras i. a. la antaŭparolo. La adresoj de SAT-anoj estas laŭ la antaŭparola informo 3.730. Ke ili multfoje obliĝu! La enhavo de Sennaciulo bone atestas pri la edukakultura laboro de SAT. La adresoj estas donitaj laŭ alfabeto sekvo de la loknomoj. Grupigo laŭ landoj eble formale devius de sennacieco, sed sendube estus praktike utila por la uzantoj de la jarlibro.



## Al la reĝo de la judoj De L. C. DEIJ

Ho, Krucumito, kiun krudaj dornoj kronas,  
ho, kia fort' magia aŭ mistero  
Vin faris tiel granda en sufero  
profunda, kian sort' aŭ mort' al ni ne donas,

sufer' terura, kian nur la judoj konas?  
Ho, diru, Granda Majstro de l' Mizero,  
vi samsortan' de l' vaga Ahasvero,  
kaptita kie judo ne, sed homo tronas!

Malkaŝu, Kristo, kiel judo povas ami  
kaj kiel VI, kovrita nur per lumbovesto,  
pro amo pli ol fajro povas flami

kaj jam mortinte ŝajnas ĝin proklami  
kun najlospasma, larmonaska benogesto...  
por ke la judo ne pereu kiel besto!

---

*Pli ol 1200 ekz. de MR restas ĉe mi nevenditaj, malgraŭ la malalta eldonnombro. Por pli mi ne havas lokon. Fordoni la superfluan kiel rubpaperon havas malmulte da senco. Vi farus grandan servon, se vi helpus al mi liberiĝi de almenaŭ parto de tiu kvanto. Igu amikojn aĉeti, uzu por daŭrigaj kursoj. La enhavo ne estas malaktuala. Mi vendos la urojn aperintajn antaŭ 1947 por po 0,50 kr. Rpk. taŭgas kiel pago. Valoro de unu rpk. estas 0,90 kr.*

*S. Engholm*